WIKIPEDIA

Kainganga lingvo

La **kainganga lingvo** (propralingve *kaingang*, *kaingáng* aŭ *kaigang*, portugale *caingangue*) estas indiĝena lingvo parolata en la sudo de Brazilo. Ĝi apartenas al la ĵeaj lingvoj. Al la etna grupo de kaingangoj nuntempe apartenas ĉirkaŭ 30 000 personoj, kaj de ili 60% ĝis 65% parolas la lingvon. Plej multaj ankaŭ parolas la portugalan.

Antaŭe la kaingangoj kaj ŝoklengoj (*Xokleng*) estis konsiderataj kiel unu etno, kaj tiu pli vasta grupiĝo ricevis plurajn kromajn nomojn inkluzive de *Amhó*, *Dorin*, *Gulachi*, *Chiqui*, *Ingain*, *Botocudo*, *Ivitorocái (= Amho) Kame*, *Kayurukré*, *Tain (= Ingain)* kaj *Taven*. Kelkaj el tiuj nomoj eble origine estis tribaj nomoj, aliaj estas eksonimoj.

Komence de la 20-a jarcento, inter alie la germandevena esperantisto Francisco Schaden alveninta al Brazilo esploris kaj verkis pri la lingvo.

Kainganga lingvo	
kaingang, kaingáng, kaigang	
Parolata en	Brazilo
Regiono	dise en la kvar sudaj brazilaj subŝtatoj San-Paŭlo, Paranao, Sankta Katarino kaj Suda Rio-Grando
Parolantoj	ĉ, 20 000
Lingvistika klasifiko	
makro-ĵea lingvaro	
ĵeaj lingvoj	
suda	
kainganga lingvo	
Lingva statuso	3 sendube endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-3	kgp
Glottolog	kain1271
Angla nomo	Kaingang
Franca nomo	kaingang

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kainganga_lingvo&oldid=6145186"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 03:42, 3 apr. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.